nia voĉo

madrida esperanto-liceo novembro 2023

## MULTAJ RENKONTOJ EN OKTOBRO

Dum la monato oktobro ni havis plurajn okazojn renkontiĝi, ĉu madride, ĉu ekster la ĉefurbo.

Kiel ni jam anoncis, la lundon, 16an de oktobro, italia samideanino Viviana prelegis pri la temo: "Stereotipoj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Islamo". Poste kelkaj madridanoj vespermanĝis kun ŝi kaj ŝia patro, loĝanta en Madrido.

Ankaŭ kiel anoncite, la dimanĉon 22an de oktobro pluraj esperantistoj ekskursis al la vilaĝo Navalagamella, kaj marŝis laŭ la "Pado de la muelejoj".

Dum la lastaj tagoj de oktobro kaj komenco de novembro vizitas nin konata esperantisto Jesper Jacobsen (fizikisto, danland-devena, loĝanta en Francio, akademiano). Krom kunveni kun samideanoj en la urbo, li prelegis la 30an de oktobro, pri la 10-a oficiala aldono al la vortaro de la Akademio, kiun li kunordigis. Li rakontis pri la procezo kaj la rezulto, kaj ankaŭ pri iloj uzitaj por tiu laboro, ĉefe la granda kolekto de revuoj kiujn li sukcesis prilabori. Sekvis vigla debato. La prelego estis filmita, kaj espereble neĉeestintoj povos ĝin baldaŭ ĝui.











## ANKORAŬ EBLAS ALIĜI AL KURSOJ DE ESPERANTO

La kurso en la sidejo de la madrida grupo komenciĝos en januaro. Ĝi estas celata al komencantoj kaj disvolviĝos la sabatojn inter la 11a kaj la 13a horoj matene. La prezentado kaj unua leciono estas programita por la 13-a de januaro. Informojn petu al: madrid@esperanto.es.

Ankoraŭ eblas aliĝi ankaŭ al la kurso de Esperanto en la Universitato UNED. Oni plilongigis la periodon de enskribiĝo ĝis la 7-a de Novembro, do bv. rapidi. Pliaj informoj: https://www.esperanto.es/hef/index.php/474.

## EN LA AMASKOMUNIKILOJ

Pedro Hernández estis intervjuita por la madrida eldono de la ĵurnalo "El Mundo". La novaĵo okupas preskaŭ unu tutan paĝon en la papera eldono, kaj povas esti malferme legata rete ĉe la adreso: https://www.elmundo.es/madrid/2023/10/25/6537fea5e9cf4adf628b4592.html.



8 EL MUNDO. Miércoles, 25 de octubre 2023

GRAN MADRID

granmadrid@elmundo.es

ENTRE GATAS Y GATOS

En pleno siglo XXI, un puñado de idealistas todavía lucha por mantener vivo el esperanto, la lengua nacida en 1887 con el objetivo de convertirse en un vehículo de comunicación universal y que acabó siendo devorada por el inglés.

Pedro Hernández es uno de los *esperantistas* convencidos, que aporta su granito de arena desde el Liceo madrileño dedicado a esta lengua, ubicado en el barrio de Argüelles. En este local se imparten cursos y se proporciona información a todos aquellos interesados en este habla, que vive un nuevo resurgir gracias a redes sociales como Instagram, Telegram o Facebook.

Actualmente, unos dos millones de personas hablan esperanto desde todos los confines del planeta: desde El Congo hasta Vietnam, desde Brasil hasta Japón... En España, lo practican más de 20.000 ciudadanos, que celebran un congreso anual que acaba de tener lugar en Sevilla.

Hernández lleva casi 30 años trabajando como traductor jurado de ucraniano, ruso, bielorruso, checo, serbio y croata. Por eso, a este madrileño aprender esperanto no le resultó difícil. Lo estudió en la adolescencia, pero empezó a utilizarlo más tarde en torno al año 2000 hasta llegar a ser profesor y presidente de la Federación española de 2009 a 2011.

«Es una lengua neutral, que no beneficia a nadie y la usa bastante gente en el mundo. Además, es muy fácil de estudiar», explica Hernández, sentado en una silla del Liceo. Según su testimonio, basta con un curso de dos horas al día durante tres meses para hablarlo con soltura. Por ejemplo, en esperanto no hay excepciones y una letra representa siempre el mismo sonido, por lo que no hay problemas de ortografía. Además, el acento recae siempre en la penúltima sílaba, pero nunca se escribe y su gramática sólo cuenta con 16 reglas básicas.

*El profesor Pedro Hernández, en la entrada del Liceo de Esperanto de Madrid, situado en el distrito de Moncloa.* SERGIO ENRÍQUEZ-NISTAL



**PEDRO HERNÁNDEZ** Imparte clases de esta lengua creada en 1887 por un oftalmólogo. Fue relegada por el inglés, pero en España tiene 20.000 hablantes

**El traductor que lucha por la supervivencia del esperanto**

ANA DEL BARRIO MADRID

Este idioma fue creado por el oftalmólogo polaco Ludwik Lejzer Zamenhof con el objetivo de convertirse en un lenguaje universal que sirviese como herramienta de intercambio. El polaco lo inventó al comprobar la incomunicación que reinaba en las plazas de su ciudad natal Bialystok (Lituania), donde escuchaba hasta seis idiomas diferentes. La lengua tuvo un cierto apogeo a principios del siglo XX, pero las dos guerras mundiales enterraron el entusiasmo por comunicarse entre los diferentes pueblos.

De hecho, las asociaciones de esperanto fueron prohibidas durante los mandatos de Hitler y de Stalin, debido a sus conexiones con el movimiento anarquista. Tras la Guerra Civil, en 1950 se creó el primer liceo de esperanto en Madrid que perdura hasta nuestros días.

Entre sus numerosas actividades se encuentra el programa *Pasporta Servo*, una red internacional que permite a los hablantes de esperanto alojarse de forma gratuita en casa de otros miembros.

Conocer gente de distintos países es otra de las motivaciones para aprender esta lengua, porque, cuando viajan a otro lugar, los *esperantistas* siempre contactan con ciudadanos que dominan este idioma. «Aquí tenemos gente de todo el mundo que busca hacer amigos. Compartimos el proyecto de una lengua común y unas ideas filosóficas. Nosotros no hablamos de fútbol, sino que tenemos otras inquietudes», sostiene.

Hernández predica con el ejemplo y habla con sus hijas en esperanto, que, para ellas, es su lengua materna. Por eso, relata orgulloso que sus hijas cantan el cumpleaños feliz en esperanto y que nunca se han sentido bichos raros. Es más, cuando eran pequeñas se comunicaban entre ellas en esperanto porque su segunda hija se fue a vivir a Alemania y sólo hablaba germano, mientras que la mayor dominaba únicamente el castellano, con lo que conversaban en esperanto.

Y la pregunta del millón: «¿Sois enemigos del idioma inglés?». «No somos enemigos de la lengua de Shakespeare, pero sí de que nos obliguen a usarla. Es una imposición cultural imperialista que beneficia exclusivamente a una cultura», concluye tajante Hernández.

ADN. EL LICEO DE ESPERANTO DE MADRID ESTÁ EN LA CALLE RODRÍGUEZ SAN PEDRO ● HABLA CON SUS HIJAS EN ESTA LENGUA ● SU CONGRESO ANUAL SE CELEBRÓ EN SEVILLA

Okaze de la sevila kongreso, la programo "Memoro de delfeno" de la radiostacio Radio Nacional de España elsendis programon pri Esperanto la 16an de oktobro. En ĝi oni intervjuis la direktoron de Fondaĵo Esperanto, Toño del Barrio, kaj oni inkludis registradon de klaso kun instruisto kaj iamaj lernantoj, gvidita de Félix Jiménez. La programon eblas aŭskulti rete ĉe adreso: http://shorturl.at/bhtM8.






## VENONTAJ RENKONTIĜOJ

Ankaŭ en tiu ĉi monato ni organizos la kutiman renkonton unuasabatan, ĉikaze la 4-an de novembro, je la 18,30, denove en la kutima loko, la polpejo Pulpería O Miño, strato Idioma Esperanto, num. 2, de Madrido (metrohaltejo Alsacia, lineo 2). Ni atendas la ĉeeston de nia vizitanto Jesper Jacobsen, ankoraŭ tiam en Madrido.

Ni renkontiĝas ĉiujn lundojn en la sidejo, de la 18,30 horo, por babili kaj praktiki la lingvon.

## PLIAJ INFORMOJ

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*, nun *X*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.